



Boletín

Nº 432 Oktobro - Decembro 2020



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 432

Redakto-skipto
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn
*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es
Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31 0204011961
TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon en la aŭtomata respondilo)

Estraro
Prezidanto: Ángel Arquillos López
Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero
Sekretario: Manuel Parra
Vicsekretario: Isidoro Ortega López
Kasisto: Jesús M. García Iturrioz
Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)
“ Ana Manero

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Feliĉan Novan Jaron al ĉiuj legantoj de Boletín, tio estas mia deziro, tamen estas la unua fojo ke mi dubas ĉu la jaro estos pli bona ol la pasinta, sed mi timas ke ne, ĉar ne eblas organizi ĉeestajn eventojn, kvankam la urĝa vakcino “solvos” grandan procenton de infektitoj, la timo kaj nefidemo daŭros kaj la permeso organizi kongreson kun minimume 100 homoj estas utopio.

Pro tio, mi profitas la okazon inviti vin partopreni la eldonadon de Boletín pere de viaj tekstoj, ĉar iamaniere de tempo al tempo, ni havas ion por diri al niaj gesamideanoj, kiuj enuiĝas hejme aŭ strate malantaŭ buŝmasko salutante per la kutoj aŭ mansigne, kaj la plej taŭga vojo estas nia publikigado, per kiu ni povas esprimi skribe niajn ideojn, ĉar iamaniere kiel sindonaj geesperantistoj, ni estas devigataj praktiki la lingvon, ĉar ĉeeste ne eblas.

Ankaŭ estas la babilejoj, kiujn mi uzas minimume du fojojn semajne, kaj mi povas certigi ke tio helpas nin multe pli ol ni imagas kaj oni sentas sin kvazaŭ ĉeeste.

En ĉi-numero vi trovos diversajn artikolojn pri kuriozaĵoj de Esperanto, amuzajojn, raportojn pri muziko, novaĵojn pri la movado kaj asocioj, ktp.

Ĝuu la legadon kaj estu optimismaj antaŭ la pandemio, ĉar nenio estas senfina.


Ángel Arquillos
Kunordiganto de Boletín

ENHAVO

Salutvortoj	1
Malĝoja lastminuta novaĵo	2
Mi volas konatiĝi kun vi	3
Ni kongresos en 2021, tamen...	5
Novaj forumoj pri informado kaj diskutado	6
Esperanto-Sumoo	6
Pri grupoj kaj Asocioj	7
Fundación Esperanto	12
Nekrologe	13
Poezia Angulo	16
Feliĉan momentaron	17
Fikipedio	19
Kotizoj revuoj de Esperanto	21
Aferoj, kiujn vi neniam legos en Vikipedio	22
Gratulon, Jorge Camacho	25
Intervjuo al María Luisa Soriano González	26
Mesaĝo de Universalla Esperanto Asocio	28
Kreskas la Informadika Skipo de HEF	30
Iom da matematiko	31

MALĜOJA LASTMINUTA NOVAĴO

Santiago Torné



La 25an de januaro 2021 forpasis en Sabadell nia veterana amiko kaj dumlonga ano de HEF, Santiago Torné i Grau, post longa malsano.

Santiago lernis Esperanton en 1960, per perkoresponda kurso de Ramón Molera, kaj estis membro de HEF ekde 1970. Li estis aktiva en la Esperanto-Centro de Sabadell; en tiu urbo li estis kunredaktoro de la ĉiusemajna Esperanto-programo de Radio Sabadell.

Li kunfondis Kulturen Asocion Esperantistan (KAE) kaj estas unu el ĝiaj estraranoj dum multaj jaroj, inter alie kiel kunredaktoro de ĝia bulteno *KAE-Informilo*. Li estas unu el la organizantoj de la Internaciaj Esperanto-Semajnoj de la Kulturo kaj Turismo. Li verkis kune kun Luis Serrano "Diccionari Català-Esperanto" (vortaro kataluna-Esperanto).

Ni kondolencas lian familion.

MI VOLAS KONATIĜI KUN VI

(Kiel mi hazarde konatiĝis kun Esperanto)



La Cuesta de Moyano estas la populara nomo de strato Claudio de Moyano en Madrido, fama pro la libroservoj aŭ budoj kun libroj (multaj el ili malnovaj kaj prez-rabatitaj), kiuj estas instalitaj apud la krado de la Botanika Ĝardeno ĉe la Paseo del Prado, kiu komuniĝas kun la Par-ko Retiro kaj nuntempe estas piedira. Ĝi nomiĝas tiel laŭ la zamo-

rana politikisto Claudio Moyano, aŭtoro de la Leĝo pri Publika Instruado de 1855 kaj kiu havas bronzan statuon ĉe la komenco de la strato.

Kial mi parolas pri tiu madrida ejo? Simple, ĉar tie mi malkovris la internacian lingvon. Tio okazis en la jaro 1979, kiam mi foliumante librojn, hazarde trovis volumon titolita *Fabeloj de Anderson*. Mi tralegis kelkajn paragrafojn kaj komprenis preskaŭ ĉion, do mi min demandis, tio ne estas itala, nek portugala nek kataluna, tiu lingvo devas esti Esperanto, la lingvo internacia, kompreneble. Mi tutcertis, kaj post kelke da tempo, ankaŭ ĉe la Cuesta Moyano, en la komenco de la strato mi vidis ulon, kiu sidis ĉe malgranda tableto kun pluraj broŝuroj kaj flug-folioj pri reklamoj de Esperanto. Ne-kredeble, li povas helpi min kaj mi tuj lin demandis pri la ebleco lerni la internacian lingvon, kaj Juan Carlos, ĉar li nomiĝis tiel, volonte indikis al mi la straton Atocha, kiu troviĝas tre proksime, tie estis la Liceo de Esperanto kaj tie mi lernis danke al la tre konata de ni ĉiuj, Augusto Casquero, ĉar li tiutempe ankaŭ loĝis en Madrido. Sufiĉis tri monatoj por akiri la necesajn konojn kaj babili pli malpli flue, okaze de Hispana Kongreso en la urbo Madrido.





mi profitis la eventon, okazinta en 1980 por ekzameniĝi, sed ne nur pri baza kurso, ĉar la ekzameno ŝajnis al mi tre simpla kaj ege facila, pro tio mi kuraĝis ekzameniĝi kaj akiri la atestilon de Esperanta Instruisto, kiu ne estis tiom facila, sed sufiĉe por

trapasi ĝin kaj ricevi diplomon. Kompreneble mi senhezite komencis instrui en la Madrida Liceo. Tio multe helpis min, ĉar por gvidi la klasojn mi estis devigata studi la lecionon por instrui kaj klarigi dubojn al la gelernantoj, kiuj estis grupo da universitatajnoj. Mi devas konfesi ke tiaj lernantoj estas la plej bonaj kaj plej ŝatataj de mi, ĉar ili rapide komprenas kaj iliaj demandoj pri duboj ĉiam rilatas al la baza kurso. Mi ĉiam timis la tipan scivolulon, kiu demandas pri ĉio kaj komplikigas kaj la instruadon kaj la lernadon, ĉar demandoj nekonvenaj perdigas tempon kaj konfuzas ĉiujn, ĉar ne kongruas kun la nivelo kaj estas embaraso por bone sekvi la instruadon.

Do, post ĉi tiu kurioza sperto ĝis la hodiaŭa tago, multe pluvis, kaj mi daŭre ĝuas la esperantan etoson kun geamikoj en la tuta mondo, kiujn tiutempe mi konis perpoŝte, ĉar nek interreto nek personaj komputiloj ekzistis, sed tio ne estis obstaklo por renkontiĝi, kongresi, teatri eĉ filmi, ĉar mi kuraĝis partopreni kiel ĉefrolulo en esperanta filmeto, titolita "Stranga nupto", kiun multaj el vi iam spektis okaze de kongresoj kaj ĝi estas eĉ ŝutebla senpage kiel ankaŭ estas senpage eĉ ŝutebla mia unuapoemaro Mediteraneaj eroj.



Pli malpli skize klarigite, vi jam konas min kaj mi esperas havi novajn okazojn por paroli pri multaj spertoj dum kvardek jaroj en Esperantujo.

Ángel Arquillos
Prezidanto de HEF

NI KONGRESOS EN 2021, TAMEN...

Apenaŭ kelkajn samajnojn antaŭ la 79a Hispana Kongreso, kiu devis okazi en Comillas (Kantabrio) de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo de 2020, la mondon trafis neantaŭvidita krizo: pandemio kaŭzata de nova kronviruso. Tiam, la Loka Kongresa Komitato, kune kun la HEF-Estraro, decidis prokrasti la kongreson ĝis oktobro de tiu sama jaro, sed la sansituacio, en tiu monato, montriĝis daŭre nefavora, kio devigis la organizantojn ne nur prokrasti denove la kongreson ĝis la 30a de aprilo de 2021, sed ankaŭ akcepti ke, pro diversaj kaŭzoj, ni ne havis kongresan alternativon.

Nun, unu jaron poste, la situacio ankoraŭ ne pliboniĝis sufiĉe, por permesi libere vojaĝi inter la diversaj regionoj de Hispanio, kaj des malpli kunveni en fermitaj lokoj. Fakte, eĉ la eblo kongresi ĉi-jare, en oktobro, estas pasero en la aero. Kion fari do? La unua decido de la HEF-Estraro estas ke ni havu kongreson en 2021.

Por certigi ĝian okazigon, tiu kongreso, kiu estos la 79a Hispana Esperanto-Kongreso, disvolviĝos en la dua duono de la jaro, kaj havos “bazan” virtualan karakteron. Fakte, HEF studas la eblon ke la virtualeco de la aranĝo estu kompletigata pere de diversaj lokaj samtempaj renkontiĝoj, se la sansituacio tion ebligas. La unua paŝo, celanta difini la strukturon de la aranĝo, estas la decido krei komisionon, kiu desegnu la necesan planon. Tiun komisionon konsistigas Alberto Granados Orcero, Vicente Manzano kaj Miguel Gutiérrez Adúriz.

Kiel eble plej baldaŭ oni difinos la daton kaj ceterajn priajn informojn. Estu do atentaj al la novaĵoj, pri kiuj HEF daŭre informos pere de sia retejo, de Boletín kaj la Bitbulteno.

La dua decido, kompreneble, rilatas al la 80a Hispana Kongreso, kiu, tion ni arde deziras, kunvenigos nin, en gaja tumultema etoso, en la bela vilaĝo Comillas, preskaŭ certe en la dekomence elektitaj tagoj, tio estas de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo, kompreneble en 2022.

La LKK de tiu 80a kongreso, okazonta en Comillas, jam informis ke ili daŭre laboras por ke tiu kongreso estu vera festo de la hispana esperanta movado.

Ángel Arquillos
Prezidanto de HEF

NOVAJ FORUMOJ PRI INFORMADO KAJ DISKUTADO

Pro la fermo de la diskutforumoj de la kompanio Yahoo, Hispana Esperanto-Federacio translokiĝis sian oficialan retforumon kaj kreis novan retliston. Se vi estas membro de la asocio, vi povas aliĝi pere de la retejo esperantujo.io, en la adreso http://esperantujo.io/mailman/listinfo/hefanaro_esperantujo.io (aŭ skribu al la Federacio se vi spertas ian malfacilaĵon)

Ankaŭ aliaj forumoj por informado kaj/aŭ diskutado devis ŝanĝi sian adreson dum tiu ĉi monato decembro. Tiu estas la kazo de la retlisto "Iberia Esperantistaro", la plej ampleksa malfermita al ĉiu esperantisto kun rilato al la movado en la iberia duoninsulo, nun alirebla en la adreso <https://groups.google.com/g/iberiaesperantistaro>, aŭ la forumo de madridaj esperantistoj (en https://groups.google.com/g/esperanto_madride). Same okazas kun aliaj internaciaj forumoj, pro kio ni rekomendas ke vi kontaktu la iamajn administrantojn aŭ skribu al ni se vi deziras trovi iun interesan forumon.

ESPERANTO-SUMOO

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Dum la luktokonkurso luktistoj estas grupigitaj en 5 grupoj. Plej fortaj luktistoj luktas en grupo nomata Jokozuna. Poste sekvas grupoj laŭ fortoj de luktistoj nomataj: Oozeki, Sekiŭake, Komusubi, Maegasira.

Okaze de tiuj konkursoj, mi proponas al vi partoprenon en lukto, kie homoj ne luktas kontraŭ aliaj homoj, sed kie homo luktas kontraŭ siaj malfortaĵoj. Tiu estas la Esperanto-Sumoo konkurso en kiu paralele kun la Sumoo-konkursoj ni legu Esperanto-librojn dormantajn en nia breto.

Vi decidu kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legu ĉiun tagon dum la konkurso. Se vi sukcesos legi tiun kvanton, vi venkos, se ne, tio signifas vian malfortaĵon. Tiamaniere vi povos vere scii la ĝojon de Esperanto-legado, sekve vi progresos multe en Esperanto, kaj se multaj partoprenos en sumoo, tio ŝanĝos la movadon, kaj sekve la mondon. Ni partoprenu kaj luktu ĝoje!!!

Rimarko: Mi metis ĉi tiun tekston sur la unuaj paĝoj de Boletín kun la celo kapti vian atenton, ĉar valoras la penon partopreni. Jen la ligilo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

Sevilo

RAPORTETO PRI LA ZAMENHOFA TAGO EN SEVILO-

La sabaton 19-a de Decembro ni kunvenis en la korto de restoracio.

Pro la viruso estis plibone tie ol ene de la manĝejo, kun malpli da bruo kaj pli da trankvilo. Varmigpendigilo helpis nin elteni la malvarmeton de pluveta tago.

Ĉijare, eble pro la cirkonstancoj ariĝis nur sepopo en du nekunitaj tabloj en tre kunigita etoso kaj senriproĉaj pladoj.

Lola García, la organizinto kiel ĉiam sindoneme, nin donacis ĉarman kvinstelan verdaĵon.

Ni tostis por kaj pro esperanto kaj poste iris alie por feste plubierumi.



Antonio R. Gash

Bizkajo

Bilbao

En la retejo de la E-Grupo de Bilbao (<https://sites.google.com/site/esperantobi/home>) troviĝas la libro skribita de nia samideano Jesús Miguel García Iturrioz, kies titolo, “Historia de la lengua internacional Esperanto en Bizkaia”, klare montras ĝian enhavon. La libro, 113-paĝa, en la hispana lingvo, estas senpage elŝutebla.

Ekde la komenco de la 20a jarcento, floris E-asocioj en nia provinco, Bizkajo. La internacia lingvo travivis, kaj suferis, la hispanan internan militon kaj la sekvan 36-jaran diktaturon, la du mondmilitojn, la malfacilaĵojn politikajn kaj ekonomiajn ... sed la E-Grupo de Bilbao sukcesis survivi ĉion-ĉi ekde ĝia fondiĝo en la jaro 1906.

Ni esperu ke estontece aperu la E-versio de la libro.



ARAGONO

Teruelo

ZAMENHOF-TAGO KUN REMEMORIGO EN TERUELO

En tiu ĉi jaro, pro la sanitaraj problemoj, la celebrado de la Zamenhof-Tago estis grave malhelpata, kaj estis nuligitaj plejparto de ĉeestaj aktivaĵoj. Inter la esceptoj ni devas menciigi la iniciaton de la grupo esperantista de Teruelo, Liberanimo, kiu omaĝis Julio Belenguer, pioniron de Esperanto en tiu urbo, en la municipa tombejo. Partoprenis membroj de la grupo kaj de la familio de Belenguer. Paroladis Alberto Granados, prezidanto de Liberanimo kaj vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kaj Serafin Aldecoa, historiisto.

Pri la agado informis la lokaj ĵurnaloj Heraldo de Aragón kaj Diario de Teruel.



ALIA REMEMORIGO EN ARAGONO, PRI EMILIO GASTÓN

Alia historia esperantisto alimaniere eĥis dum pasintaj semajnoj en la aragonaj amaskomunikiloj: la regiona televido Aragón Televisión parolis en sia novaĵservo de la 7a de decembro pri la donacado de la persona biblioteko de Emilio Gastón Sanz (advokato, poeto, regiona popoldefendanto, esperantisto), forpasinta en 2018, inklude de liaj libroj en Esperanto. Oni povas spekti la novaĵon en tiu ĉi ligilo <http://alacarta.aragontelevisión.es/informativos/aragon-noticias-2-07122020-2030> (ekde minuto 25:40)

Krome, la 19an de decembro estis inaŭgurita la “Spaco Emilio Gastón”, kun diversaj personaj objektoj, en la sidejo de la “Justicia de Aragón” (popoldefendanto) en Zaragozo.

MADRIDA REGIONO

MADRIDA ESPERANTO-LICEO KUNVENAS RETE

Pro la pandemia situacio, la kunvenoj de Madrida Esperanto-Liceo devas nun okazi rete, ĉar la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio nur malfermiĝas por tute necesaj demarŝoj.

Ekzemple, la Zamenhof-Tago 2020 en Madrido devis transiri al la virtuala mondo. Ĝi disvolviĝis dum la mateno de la sabato 12a de decembro, per la servo Jitsi. Post mallonga saluto de la prezidanto de MEL, Félix Jiménez Lobo, okazis du prelegoj. Unue Pedro Hernández prelegis pri la funebraj ritoj en malnova Egipto, kaj poste Félix prelegis pri la Esperanto-kursoj en la universitato UNED. La kunveno finiĝis per komuna virtuala tosto.



La tradicia unuasabata renkontiĝo plu okazas regule ĉiun unuan sabaton (aŭ foje la duan, depende de la festoj). Lastatempe aliĝas pli kaj pli homoj el aliaj urboj de la mondo, do ni invitas ĉiujn amikojn de aliaj urboj, aliĝi la unuan sabaton de ĉiu monato, je la 6a vespere, ĉe de la adreso <https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto>.

Se vi neniam ĉeestis, ni memorigas ke la proceduro estas ja tre facila. Oni povas klaki la supre menciitan adreson en ajna navigilo aŭ rekte uzi programon Jitsi en komputilo aŭ telefono kaj aliri la renkontiĝejon “MadridaSabataRenkonto” aŭ. La babilejo estas malferma por iu ajn esperantisto, komencanto aŭ progresinto, madridano aŭ loĝanto en alia loko.

PARTOPRENU EN LA BELARTAJ KONKURSOJ 2021

Anonciĝis jam la kunvoko de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 2021, kies prezidanto kaj sekretario, kie lkonate, estas respektive la hispaniaj verkistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutiérrez Adúriz.

Kiel kutime, la branĉoj estas poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj infanlibro, kun la antaŭnelonge kreitaj subbranĉoj “Mikronovelo” kaj “Monologo aŭ skeĉo”. Ĉijare UEA enkondukas novan branĉon, nomatan *Kantoteksto*, kun la celo provizi E-kant-istojn per bonaj kantotekstoj por iliaj repertuaroj. La unu-sola premio en tiu ĉi branĉo konsistos en muzikigo de la premiita teksto kaj prezento de la rezulta kanto fare de kantisto aŭ grupo.

La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publik-igitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkurs-aĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. La limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2021.

La rezultojn oni anoncos, ĉu ĉeeste, kadre de la 106-a Universala Kongreso de Esperanto en Belfasto (Nord-Irlando), se oni ĝin fine povos okazigi, ĉu iam, inter julio kaj septembro, kadre de virtuala BK-Festo samspeca kiel la ĉi-jara.

Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Prozo, subbranĉo Mikronovelo: (maksimuma longo 100 vortoj). Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas *Premio Paula Adúriz*.

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksita.

Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unupersona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu- aŭ divers-persona): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas *Premio María Cuevas*.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas *Premio Luigi Minnaja*.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2020. Aljuĝata estas nur unu premio.

Kantoteksto: maksimuma longo ne fiksita.

Se vi interesiĝas, sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al *Belartaj Konkursoj de UEA*, ĉe Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retpoŝte al la adreso: belartajkonkursoj@gmail.com; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: *los Coteros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio*, nepre indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro.



Premioj: en la branĉoj *Poezio*, *Prozo*, *Teatraĵo* kaj *Eseo*: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €. En la branĉo *Infanlibro de la Jaro* 546 €. En la du subbranĉoj *Mikronovelo* kaj *Monologo aŭ Skeĉo* po 125 €. La unusola premio en la branĉo *Kantoteksto* konsistas en muzikigo de la premiita teksto kaj diversmedia prezento de la rezulta kanto en ludado far kantisto aŭ kantogrupo.

Noto: la enkonduko de la branĉo *Kantoteksto* ne estas oficiala. Ĝi okazas nur prove. Ties definitiva aligo al la BK-fakoj dependos de la grado de partopreno.

Pliaj informoj pri la kunvoko troviĝas en la retejo de UEA ĉe: <https://uea.org/gk/915a1>.
 Detala regularo, ĉe la ĝenerala adreso:
https://uea.org/teko/regularoj/belartaj_konkursoj.

FUNDACIÓN ESPERANTO

En decembro 2020 okazis kunsido de la patronaro. Unue ni memoris pri Antonio Marco Botella, antaŭa prezidanto, kiu mortis la 4an de novembro 2020 (post longa vivo kaj longa dediĉo al Esperanto).

INFORMADO PRI 2020

La helpoj programitaj por 2020 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 428 de "Boletín" (okt-dec.2019) de HEF.

Kiel oni scias, ni disponas je modesta kvanto por helpoj. Ni ricevis peton de nur unu grupo. Sekve, ni decidis destini helpon al tiu grupo. Nome:

- Grupo Esperantista de Bilbao: 300 €. Pro organizado de E-kursoj.

Krome, kiel kutime, en nia sidejo en Zaragozo estis organizitaj E-kursoj.

PROJEKTOJ POR 2021

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2021.

Principe, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 600 €.

Menciindas, ke ekde nun estas nova direktoro de la fondaĵo. Nome, José Antonio del Barrio, kiu jam agadis iam en tiu posteno kaj kiu poste elstaris pro longa kaj kvalita respondecado kiel HEF-Prezidanto.

Lorenzo Noguero

(Prezidanto de "Fundación Esperanto")

NEKROLOGE

Eduardo Vivancos (1920-2020)



Eduardo Vivancos naskiĝis en Barcelono en 1920. Tri monatojn antaŭ sia dekkvara naskiĝdatreveno li komencis sian laboristan vivon, kaj iom poste li aliĝis al CNT, la ĉefa anarkiisma sindikato en Eŭropo. Dume li studis ĉe la Laborlernejo kaj ekde 1937 ĉe la Laborista (mezgrada) Instituto de Barcelono. En la Popola Enciklopedia Ateneo li lernis la racian lingvon Esperanto, kiun li komprenis kiel esencan elementon de nova mondo konstruota. Li disvastigis la lingvon inter siaj kamaradoj, korespondis kun homoj el eksterlando, verkis artikolojn, ĉestis eventojn, organizis kursojn, fondis grupojn ktp. Membro de Liberecana Junularo kaj de Studenta Federacio de Liberaĵ Konsciencoj, en la Esperanto-rondoj li sentis sin proksima al Iberia Ligo de Esperantistaj

Senŝtatanoj.

Krome, li pasie praktikis atletismon. Neforgesebla memoro estis tiu pri lia trejnado en la stadiono Montjuïc, la tagon antaŭ la oficiala malfermo de la Popolaj Olimpikoj de Barcelono en 1936. En tiu evento li devis kuri la distancon de 5000 metroj. Ĉar la (ordinaraj) Olimpikoj en 1936 okazus en la hitlera Berlino, oni proponis bojkoti ilin organizante samjare Popolajn Olimpikojn en Barcelono. Ili estis eksterordinaraj kaj el kultura kaj el sporta perspektivoj. Finfine tiuj Popolaj Olimpikoj ne okazis pro la milita puĉo.

Barcelono sufokis la ribelon, kaj la anarkiistoj profitis la okazon por plenumi sian deziratan socian revolucion. Al ĝi Eduardo kontribuis entuziasme, travivante spertojn, kiuj influis lin porĉiame. Dume la urbo suferis bombadojn kaj eĉ batalon inter komunistoj kaj anarkiistoj. Pro la zorgiga disvolviĝo de la milito, li volontulis kiel soldato.

Tiam li estis deksepjaraĝa. En la fronto li suferis militajn malvenkojn, kaj ĉeestis la morton de kamaradoj, tiel maturiĝante frutempe. Li ankaŭ fariĝis kultura komisario, instruante analfabetajn kamaradojn legi kaj skribi. Aldone, li instruis al la junaj soldatoj la internacian lingvon, kaj kune ili informiĝis pri la evoluo de la milito per Esperantlingvaj publikaĵoj kiel *Informa Bulteno* de CNT/FAI.

Kune kun centmiloj da homoj (inkluzive de sia patro), Eduardo trapasis la Pireneojn piede dum la malvarma vintro de 1939. Li travivis la terurajn francajn koncentrejojn, kaj ankaŭ partoprenis laborkompaniojn en Germanio. Temis pri jaroj da malsato kaj sufero, sed ankaŭ da solidareco kaj kamaradeco. Ne malofte li trovis esperantajn grupojn en tiaj lokoj. Post la fino de la mondmilito, li loĝis en Parizo. En 1945 li aliĝis al SAT, kaj partoprenis la liberecanajn rondojn de la hispanaj rifuĝintoj. Tie li konatiĝis kun Ramona, tie naskiĝis Floreal kaj Talia, kaj tien alvenis, post odiseado tra la pirenea montaro, liaj patrino kaj fratino (Juliette). Ĉi-lastata entuziasmiĝis pri Esperanto, kaj ekde tiam ambaŭ gefratoj komunikiĝis en tiu lingvo.

En Parizo, Eduardo ludis ŝlosilan rolon en la liberecana movado. Li redaktoris *Senŝtatano*-n, la bultenon de Internacia Anarkiisma Junularo, tute eldonatan en Esperanto. En periodo, kiam ne ekzistis diplomaciaj rilatoj inter Hispanio kaj Francio, pere de siaj korespondantoj en diversaj landoj ĉi tiu publikaĵo faciligis poŝtajn komunikojn inter la ekzilitoj kaj iliaj familioj. Krome ĝi kontribuis al la plifortigo de la rilatoj inter eŭropaj kaj aziaj liberecanoj.

Kiam evidentiĝis, ke la diktaturo en Hispanio daŭros, Eduardo kaj lia familio decidis translokiĝi al lando proponanta pli bonajn eblecojn al enmigrintoj: Kanado. Estis la jaro 1954. En Toronto ili ekkontaktis hispanajn ekzilitojn, sed ankaŭ la lokan Esperanto-movadon, kiu helpis ilin orientiĝi en tiu nova etapo. Siaflanke Eduardo ĝin motoris dum jardekoj, instruante la lingvon al pluraj generacioj de esperantistoj, kaj efike organizante publikajn aranĝojn. En 1973 okazis tie la unua SAT-kongreso ekster Eŭropo, kaj en 1987 granda ekspozicio en la urba biblioteko. Samjare Eduardo kunordigis la aperigon de multlingva propaganda filmo pri la internacia lingvo Esperanto.

En Toronto li denove kuris kaj kunfondis sportan klubon por veteranoj. Li partoprenis en popularaj maratonoj (inkluzive de tiu de Bostono) kaj, kiel membro de la kanada nacia teamo, en mondaj konkursoj por veteranoj. Aliflanke, lia laboro en la poŝta oficejo ebligis al li realigi longe deziratan revon: studi universitate la hispanan literaturon. Post dekdu jaroj de vespera studado li kompletigis altlernejon, licencion kaj magistriĝon.

Eduardo korespondis kun aliaj ekzilitoj kaj verkis pri Esperanto en liberecanaj publikaĵoj. Krome, la tuta familio partoprenis regule en la eventoj organizataj de Kanada-Hispana Asocio por Demokratio. En tiu kadro, Eduardo organizis la viziton al Toronto de konataj figuroj de la kontraŭfrankisma lukto, kiel Federica Montseny kaj Enrique Tierno Galván. Kaj li publike kontraŭis la okazigon de la madrida UK-o en 1968.

Tiuepoke, Eduardo tradukis la ĉefan verkon pri la pensado de Lao Tsé en la hispanan, pere de ponta versio en Esperanto farita de Taiji Yamaga. Okaze de monda konkurso pri atletismo por veteranoj, Eduardo vizitis la familion de Yamaga en Japanio. Li vizitis ankaŭ Ĉinion, kaj skribis detale pri tiuj vojaĝoj en la gazeto de Kataluna Kulturcentro de Toronto, gazeto kun kiu li regule kunlaboris dum jardeko.


Post la morto de la diktatoro li vizitis Barcelonon plurfoje. En 1986, li ĉeestis la SAT-kongreson okazintan en la apuda urbeto Sant Cugat, kie li prelegis pri siaj spertoj dum la milito kaj socia revolucio. En 2019 li aliĝis solidare al la SAT-kongreso de Barcelono, sciante, ke ĉi-foje li ne povis vojaĝi al sia amata naskiĝurbo.

La lastajn jarojn de sia vivo, li kaj sia filo Floreal emis kunaŭskultadi poezion. Eduardo aparte ŝategis la *Piratan kanton* de José de Espronceda. Ili kunaŭskultadis ankaŭ revoluciajn kantojn, kiel *Ek la Barikadoj!* kaj *Idoj de l' popolo*, kiuj altigis la animon de Eduardo. Kaj francajn kantistojn, kiel Edith Piaf kaj Maurice Chevalier, ĉefe ties kanton *À Barcelone*. Pere de muziko kaj poezio, li memoradis sian vivon.

Dum pli ol jarcento Eduardo faris sian propran vojon, libera kaj libere, kiel bele esprimas la poemon de Espronceda.

Bonan vojaĝon, kara Eduardo, la tero estu al vi malpeza!

Xavi Alcalde



La 19an de januaro subite mortis Morice Benin (1947-2021), franca kantaŭtoro, komponisto kaj kantisto, inter kies pli ol 30 albumoj estas ankaŭ unu en Esperanto (In-Spir, 2001).

Nekrologo ĵus aperis en La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2021/01/nekrologo-55/>

POEZIA ANGULO

Ángel Arquillos

Ĉe sonizolita ĉambro

Ĉe sonizolita ĉambro
mi tralegas poemaron
por korekti kelkajn versojn
kreitajn kun granda hasto.

Mi korektas kun malĝojo
pri amo, variajn vortojn,
kun granda hast' elektitaj
senpudore kaj sen honto.

Nun mi vivas la realon
ĉe mia izolita ĉambro
kie rompas la silenton
la sono de miaj larmoj.

Mia kolombino

Mia blanka kolombino
Kun timo flugis tre alten
Al ia ĉiel-destino,
Blankajn nubojn trapasante.

Kun konfuzo kaj angoro
Ĝi forlasis min ploranta,
Ĉar ĝi estis mia floro
Kaj ĝia kverad' ja mankas.

FELIĈAN MOMENTARON!

Jes, ja! Jaro ja estas momentaro. Eĉ jaro povus esti konsiderata kiel aro da "j": aro da monatoj, semajnoj, tagoj... momentoj...

Jaro esta tempomezurunuo, egala al rondiro de Tero ĉirkaŭ Suno. La homoj por mezuri la tempon uzis kalendarojn. "Kalendaro" devenas el "kalendo", la unua tago de la monato en la antikva romia kalendaro.


En la romia kalendaro, en la komenco (kun Romulo), la jaro konsistis el nur dek monatoj: de marto (eko de la jaro) ĝis decembro. Nur la unuaj kvar havis apartan nomon. La aliaj ses havis nomojn rilate al ordo: "Quintilis" (la kvina), "Sextilis" (la sesa), "Septembris" (la sepa), "Octobris" (la oka), "Novembris" (la naŭa) kaj "Decembris" (la deka). Poste oni aldonis kvindek unu tagojn pliajn kiuj iĝis du aliaj monatoj ("Januarus" kaj "Februarus"). Pli poste, "Quintilis" kaj "Sextilis" ricevis aliajn nomojn: "Julius" honore al Julio Cezaro kaj "Aŭgustus" honore al Oktavio Aŭgusto.

En la epoko de Julio Cezaro oni faris reformon, aldonante superjaron post ĉiuj kvar jaroj, ĉar la rondiro de la Tero ĉirkaŭ la Suno daŭris iom pli ol 365 tagoj (pli malpli 365 tagoj kaj kvarono).

La aktuala kalendaro devenas el alia reformo, farita kun papo Gregorio la XIIIa. Temis pri la fakto ke la daŭro de la rondiro ne estis ekzakte tiu starigita laŭ la julia kalendaro (La julia jaro estis iomete pli longa ol devus). Kaj dum tiuj jaroj fariĝis diferenco de 10 tagoj. Post tiu reformo, estas superjaro ĉiu jaro dividebla per kvar escepte de jarcentoj, en kiuj nur estas superjaro ĉiu jaro dividebla per 400. Por aktualigi la tiaman kalendaron, en 1582, al la (julia) jaŭdo 4a de oktobro sekvis la (gregoria) vendredo 15a de oktobro. Tial, Sankta Tereza mortis la 4an de oktobro 1582 kaj la sekva tago post tiu morto estis la 15a de oktobro.

Tiu gregoria reformo estis tuj akceptita en landoj kie la katolika Eklezio havis influon. En aliaj, okazis pli poste. Ekzemple, en Anglio en 1752, en Sovetunio en 1918. Tial, laŭdire Cervantes kaj Shakespeare mortis la 23an de aprilo 1616 sed kun 10 tagoj de diferenco, ĉar tiam Anglio ankoraŭ havis la julian kalendaron (laŭdire, ĉar fakte Cervantes mortis la 22an kaj la 23an estis enterigata). Kaj ekzemple, la naskiĝo de L. L. Zamenhof okazis tiam oficiale la 3an de decembro (laŭ julia kalendaro) aŭ la 15an laŭ la aktuala kalendaro.

Ekzistas diversaj tipoj de kalendaroj kaj mezuro de tempo en jaroj. Ekzemple, laŭ civilizacioj, estas diversaj kalendaroj: majaa persa, hebrea, helena, islama, ĉina... En la jaro 2021, la hebrea kalendaro iras de la jaro 5781 al 5782; en la araba, de la jaro 1442 al la jaro 1443...



Ankaŭ ekzistis diversaj proponoj pri reformo. Ekzemple, la frances-publika "revolucia" kalendaro kun kuriozaj nomoj. Kaj aperis proponoj por raciigi la kalendaron, kiel "monda kalendaro" (Marco Mastrofini / Elisabeth Achelis) aŭ "internacia fiksa kalendaro" (Auguste Comte / Cotsworth).

Laŭ aliaj kriterioj, oni povus paroli pri "eterna (aŭ porĉiama) kalendaro" kaj ankaŭ pri "minimuma kalendaro". En ĉi tiuj, pere de tabulo, oni povas kontroli la tago(j)n de la semajno kiu rilatas al iu ajn tago.

Jen du ekzemploj de "minimuma kalendaro" en Esperanto por la nuna jaro 2021. Unu estis farita de Miĥaelo Rikardo Balicki kaj la alia de Zeroni Santos.

Per "minimumaj kalendaro" mi deziras ke la nuna jaro estu maksimume plena je vivindaj momentoj.

Lorenzo Noguero

JANUARO	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ
FEBRUARO	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim
MARTO	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim
APRILIO	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar	Mer
MAJO	Sab	Dim	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven
JUNIO	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim	Lun
KALENDARO 2021	1	2	3	4	5	6	7
	8	9	10	11	12	13	14
	15	16	17	18	19	20	21
	22	23	24	25	26	27	28
	29	30	31				
JULIO	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar	Mer
AŬGUSTO	Dim	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab
SEPTEMBRO	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar
OKTOBRO	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ
NOVEMBRO	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim
DECEMBRO	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar

2021	1	2	3	4	5	6	7		
	8	9	10	11	12	13	14		
	15	16	17	18	19	20	21		
	22	23	24	25	26	27	28		
	29	30	31						
feb.	mar.	nov.	lun.	mar.	mer.	ĵaŭ.	ven.	sab.	dim.
jun.			mar.	mer.	ĵaŭ.	ven.	sab.	dim.	lun.
sep.	dec.		mer.	ĵaŭ.	ven.	sab.	dim.	lun.	mar.
apr.	jul.		ĵaŭ.	ven.	sab.	dim.	lun.	mar.	mer.
jan.	okt.		ven.	sab.	dim.	lun.	mar.	mer.	ĵaŭ.
maj.			sab.	dim.	lun.	mar.	mer.	ĵaŭ.	ven.
aŭg.			dim.	lun.	mar.	mer.	ĵaŭ.	ven.	sab.

FIKIPEDIO

Ĉu mi uzas en la titolo la prefikson fi- aŭ la radikon fik-, ne gravas. Ĉiuokaze la leganto tuj rimarkos, ke temas pri negativeco; rare, se oni konsideras, ke mi ofte parolis pozitive pri Vikipedio en diversaj okazoj. Fakte mi foje propagandis kongrese prie kaj eĉ klopodis instigi la kunlaboradon tiukadre. Krome mi ĉiutage dediĉas horojn al tiu afero. Sed tio estas nun pli mia propra plezuro ol kontribuo al kolektiva entrepreno, kiu fakte ja ankaŭ estas.

Tamen “Boletín” bezonas iom da varieco kaj pro tio nun mi agos kiel diablodefendanto, alivorte kiel anĝelakuzisto. Ĉar same kiel okazas pri Esperanto, nome ke foje oni parolas tro pozitive pri Esperanto, Esperantujo kaj esperantistoj, la realo tro ofte kontraŭdiras. Nu, pri Vikipedio ni iru al faktoj. Ni komencu de la ĝenerala sistemo, kvankam multaj el la detaloj pri kiuj mi parolos same observeblas en nia kara preskaŭ tricentmilula esperanta versio.

Iam, en la paĝoj de “Sennacieca Revuo” mi publikigis artikolojn pri kiel Vikipedio estas uzata de entuziasmoj de lingvoj foje rilataj al naciismaj, regionismaj politikaj sentoj por povi propagandi pri siaj kultur-sociaj atingoj. Tio klarigas kiel ekzemple la kataluna estas la dudeka lingvo en la mondo kun plej da artikoloj kaj bona kvalito (profundeco, pri tio mi poste parolos), antaŭ lingvoj kun fortaj komunumoj kiel la serba, indonezia, norvega, korea, finna, hungara, ĉeĥa, rumana, turka ktp. Ne nur la kataluna, eĉ pli malfortaj komunumoj uzis saman rimedon. Mi jam menciis en SR la klopodojn de lingvoj, respektive dialektoj, el Filipinoj, kiuj estas je la pinto, ekzemple la cebua je la dua loko post nur la angla, kun 5 milionoj kaj duono da artikoloj, kontraŭ 6 milionoj en la angla.

Kiel tio povas esti? nu, per robotoj, kiu eble tradukas nur unu frazon: ikso estas urbo de ipsilon ktp. La cebua estas parolata de 20 milionoj da parolantoj, kaj konkurencas kun la tagaloga pli ĝenerala en Filipinoj, do soci-kultur-politika konkurenco. Kaj tial la cebua estas artefarite super la germana, franca, rusa, itala, hispana lingvoj, multe pli meritantaj. La profundeco (tio estas amplekseco de artikoloj laŭ diversaj kriterioj) de la cebua estus nur 2 kontraŭ 1043 de la angla aŭ 240 de la franca. Kaj la cebua ne estas la nura kazo: la varaja lingvo kun tri milionoj da parolantoj ankaŭ en Filipinoj estas la deknua lingvo en la mondo antaŭ ekzemple la vietnama, la japana, la ĉina kaj la araba.

Multaj aliaj komunumoj imitis. Lastatempe en teritorioj de la iama Sovetunio, kompreneble konkurenco kun la domininta rusa kaj Rusio, respektive: tiel en la rangigo subite aperis per tradukrobotoj (kaj plej verŝajne, per fuŝaj tradukoj) la ĉeĉena en 30a loko antaŭ Esperanto, la sudazerbajĝana (40a), la tatara (41a), la kazaĥa (43a), ĉiuj kun malbona profundeco, ekzemple kompare kun Esperanto. Tamen ankaŭ esperantistoj turnas sin al amasa enmetado de artikoloj, el kiu multaj (miloj) estas nur skeletoj. Tamen ni povas iomete fanfaroni, ke kontraste multaj aliaj esperantistoj ja plenigas

de interesa enhavo la artikolojn. Definitive estas klare, ke la artikolnombro ne povas esti definitiva kriterio por determini la kvaliton de enciklopedio. Tamen kio alia?

Ni iru al la enhavo. Ĉu vi scias, de kie venas multaj datumoj pri landoj, urboj, geografio ktp.? El la CIA, jes, el la Central Intelligence Agency, nome sekreta servo de Usono, kiu tiom utilis por intrigo de filmoj, kaj precize el la CIA “World Factbook”. Prie vi povas legi en Esperanto, en Vikipedio! Vi povas imagi aŭ suspekti, ĉu diversaj informoj povas esti manipolitaj, ekzemple se temas pri armado, ekonomio, politiko de “tiklaj” landoj, kiel Israelo, Irano, Norda Koreio, Venezuelo ktp. Nur por citi tiujn kiuj plej aperas televide kaj gazetare. Granda parto de la informo en la diverslingvaj versioj estas tradukoj el la angla. Mi mem faras tion. Do imagu kian rigardon oni faras al la mondo.

Kaj ne temas nur pri datumoj, kiuj ofte estas malfacile kontrasteblaj, certigeblaj, sed io simila okazas en la soci-politika, ideologia enhavo de multaj artikoloj. Ja estas pli ol milo da administrantoj kaj pli ol cent mil aktivaj uzantoj en la anglalingva vikipedio, dum malpli ol 16 administrantoj kaj 389 aktivaj uzantoj en Esperanto. Do, oni povas supozi la politikajn tendencojn kiuj hegemonias en la tuta sistemo. Nur la proporcio inter apero kaj neapero jam estas klare indikiga. Vi povas imagi kiom da anglalingvaj sciencistoj, verkistoj, kantistoj, aktoroj aperas en la vikipedioj kaj kiom da japanaj, koreaj, vietnamaj, arabaj, latinamerikaj, rusaj, barataj, afrikaj ktp. Se ne paroli pri la ekonomiaj interesoj ligataj al aperoj kaj neaperoj de entreprenoj, negocoj, ekonomiaj sektoroj ktp.

Kompreneble oni povas reagi kontraŭ tio, eĉ en la anglalingva aŭ aliaj majoritataj versioj. Ekzemple delonge okazas kampanjoj por kreado de artikoloj pri virinoj por iomete ekvilibri la enorman aperon de masklaj gravuloj en ĉiuj epokoj kaj landoj, kaj kampanjoj pri Azio, Afriko ktp. Ankaŭ tio iomete okazas en la esperanta versio, sed tamen oni suferas pri troa persona dediĉo, dum aliaj gravaj sferoj restas iom povraj. Ekzemple oni kreas multajn artikolojn pri asteroidoj, hungaroj, eŭropaj municipoj, germanaj protestantoj ktp. Dume aliaj fakoj atendas vian kontribuon.

Kani



KOTIZOJ POR LA JENAJ REVUOJ JARO 2021

REVUO ESPERANTO

MB MA SA KTO SZ PT MB-50% MB-75%

27 57 45 18 114 44 14 7

MB Membro baza. **MA** Membro abonanto
SA Simpla abonanto **KTO** abonanto de Kontakto
ZS Membro Societo Zamenhof **PT** Patrono de TEJO
MB -75% rabato ĝis 19 jaroj, -50% por 20-25 jaraĝaj

<https://uea.org/alighoj/kotiztabelo2020>

REVUO MONATO

SURFACE 59 Eŭroj

AERE (+3) 62 “

RETE35,4 “

REVUO LA JARO

LA JARO 6,9 Eŭroj

LA JARO (AERE).....9,9 “

<https://www.monato.be/tarifoj.php>

KIEL PAGI

Pere de la konto de la Peranto/kunlaboranto:

TITULAR: PEDRO A. GARROTE ESCRIBANO


BANKO: BANCO SANTANDER EN VALLADOLID

(Antaŭe estis Banko Banesto)

Ne forgesu informi pri la pago

Hisperanto.uea@gmail.com

ESPERANTO-TOMBOJ EN ANDALUZIO



AFEROJ, KIUJN VI NENIAM LEGOS EN WIKIPEDIO

Sufiĉe konata estas la *ZEO*-j, tiuj lokoj, insuloj, ŝipoj, monumentoj, stratoj... kaj eĉ satelitoj, kiuj ricevis la nomon “Zamenhof” aŭ “Esperanto”. Ĉi tiuj objektoj kaj lokoj troveblas tra la tuta mondo kaj eĉ en la spaco, kompreneble ankaŭ en Hispanio. Tamen, ankaŭ oni devas elstari la fakton, ke ekzistas tomboj kiuj sciigas pri la esperantisteco de la forpasintoj, ĉar ilia celo estis diskonigi nian lingvon eterne.

Ne eblas diri ekzakte kiom da tiaj tomboj oni povas viziti en Hispanio, sed eblas aserti, ke en Andaluzio du el tiuj tomboj ekzistas. Unu el ili troviĝas en la urbo Sevilo kaj la alia en Kordovo

Ĉe la tombejo “San Fernando” en Sevilo troviĝas la tombo de Tomás Caspe Cereijo. Ĉu Tomas Caspe aŭ Antolín Colmenar? Tiuj ni, kiuj konis persone nian samideanon Antolín, ĉiam dubis pri kiamaniere nomi lin. Mi ŝerce eĉ nomis lin “Edmondo Dantés”, la Grafo de Montekristo, pro la fakto, ke lia vivo ĉiam memorigis al mi tiun heroon de Aleksandro Dumas. Tomás León Caspe Cereijo naskiĝis en la jaro 1911. Li lernis esperanton ĉe socialisma sidejo en Madrido, tie li estis aktiva membro de la sindikato UGT. Kiam la hispana milito komenciĝis en la jaro 1936 lia aliĝis al bataliono de popolaj milicioj. Kiam la milito finiĝis en la jaro 1939 li troviĝis en Valencio kune kun la lastaj restaĵoj de la respublikana armeo. Malliberigita tiam, la nova politika hispana reĝimo kondamnis lin je 30 jaroj da mallibero. Ĉe la prizono li estis ĝis la jaro 1944 kiam li sukcesis fuĝi en El Escorial (Madrid) kiam li laboris kiel kondamnito dum la konstruo de la “Valle de los Caidos”, faraona monumento de la frankisma reĝimo por memori la viktimojn de la milito.



Membroj de la E-grupo de Sevilo okaze de omaĝo antaŭ la tombo de Tomás Caspe

Tomás iris en Sevilon, li serĉis urbon kie li estus tute ne-konata kaj tiel komenci novan vivon, pro tio li ŝanĝis sian nomon kaj ekde tiam Tomás Caspe fariĝis Antolín Colmenar. En Sevilo li laboris kiel tegisto kaj li aliĝis al la kaŝita socialisma partio, tiutempe tute malpermesita. Li ankaŭ komencis instrui esperanton. Verdire, kiu ajn lerta polic-inspektoro povus malkovri lin, tio estas: aktiva esperantisto malaperis en El Escorial (Madrid) kaj samtempe aktiva esperantisto komencis disvastigi la lingvon en Sevilo, sed policanoj tiutempe vere ne sciis kio estis tio pri la internacia lingvo, bonŝance por Antolín kaj por esperanto. Tomás, jam Antolín, estis aktiva socialisto, li agadis kiel kaŝita delegito en Sevilo de la socialisma partio en Hispanio. De tempo al tempo li vojaĝis en Madrido por subteni kontaktojn kun la kaŝita estraro de la partio PSOE.

Okaze de la nova demokratia reĝimo en Hispanio en la jaro 1978, kiam la socialisma partio fariĝis la dua politika partio en nia lando laŭ nombro da deputitoj en la parlamento, Antolín kontraŭstaris al la estraro de la partio PSOE, gvidita tiam de du sevilanoj: Felipe González kaj Alfonso Guerra. Li preferis enkadriĝi ĉe la plej radikala flanko de la partio, tiu nomita “historia PSOE”. Li eĉ partoprenis kiel kandidato okaze de la balotadoj por la parlamento de la jaro 1982 kiel kapo de tiu antikva sekcio de la socialisma partio PSOE en Sevilo, tamen li ne sukcesis atingi seĝon en la parlamento.

Antolín estis aktiva esperantisto. Li fondis la Sevilan Akademion de Esperanto kaj dum la 70aj jaroj de la pasinta jarcento li estis reprezentanto de Hispana Esperanto-Federacio en Andaluzio. Li ankaŭ partoprenis en la renaskiĝo de la andaluzia esperanto-movado ekde la jaro 1983. En la jaro 1991, kiam li eliris el la sidejo de la Esperanto-Akademio en Sevilo post la okazigo de kurso, akompanita de Anita, sia edzino, ŝtelistoj prirabis ilin. Li pruvis defendi sian edzinon kaj pro tio li ricevis frapon kiu faligis lin sur-teren. Li forpasis en la hospitalo la 16-a de januaro de 1991.


Oni entombigis lin, lia ĉerko kovrita de E-flago. Sur la tombo-ŝtono aperas gravurita kvin-pinkta stelo kaj meze la litero “E”. Ankaŭ la vortoj “Esperanto” kaj “Jen pacbatalinto”. Paco por li signifis la unuiĝon de la homaro pere de internacia lingvo kaj progresema idearo. Sevila Esperanto-Asocio, de tempo al tempo, okazigas vizitojn al tiu ununura tombo en Sevilo kiu diskonigas la internacian lingvon.



Jen detalo de la tombo-ŝtono de Tomás Caspe en Sevilo

En Kordovo troviĝas la antikva tombejo “La Salud”. Verdire tiu nomo montras du kontraŭ-flankajn ideojn: tombejo kaj saneco. La klarigo estas simpla, tiu tombejo estas dediĉita al la Virgulino de la Sano (“la Salud” en la hispana lingvo) kaj pro tio jen la nomo.

Ĉe tiu tombejo estas eble viziti la tombon de Pantaleón Marivela Sanz. Li estis prestiĝa teknikisto de elektro-kompanio en Kordovo. Verŝajne li lernis la internacian lingvon ĉirkaŭ la jaro 1915, nur unu jaro poste li jam estis membro de la estraro de la Kordova Esperanto-Grupo kaj en 1925 li kunlaboris en la organizado de la 5-a Hispana Kongreso de Esperanto. Pantaleón Marivela forpasis la 3-a de januaro de 1929, oni entombigis lin en tiu tombejo de “la Salud” en Kordovo. Sur la tombo-ŝtono, krom la nomo kaj biografiaj datoj, aperas ankaŭ gravuraĵo kun lia portreto. Oni sciigas ankaŭ, ke tiu tombo-ŝtono estas memoraĵo de liaj kunuloj, sed, pri kiuj kunuloj temas? Ĉu tiuj de la elektra kompanio? Povus esti, tamen nenio aperas pri tio sur la ŝtono.




Tamen, rimarkinda estas la fakto, ke la gravuraĵo montras portreton de Pantaleón Marivela kaj sur la jako aperas simbolo, temas pri kvin-pinkta steleto. Do, tiuj kiuj deziris memori lin pere de tiu tomo-ŝtono celis montri, ke Pantaleón Marivela estis esperantisto, tiel estas eble supozi, ke la kunuloj kiuj pagis tiun memoraĵon apartenis ankaŭ al la Esperanto-grupo de la urbo Kordovo.

Sur la tomo, ĉiun 3-an de januaro, aperas du floroj, unu blanka kaj la alia verda, lasitaj de esperantisto por memori nian malnovan samideanon. Verdire, estas homoj por kiuj Esperanto estis tiel grava afero en iliaj vivoj, ke ili deziris diskonigi ĝin por-eterne.

J.M.R.H.

GRATULON, JORGE CAMACHO!



En intervjuo publikigita en aŭstra ĵurnalo, Clemens Setz nomas Jorge Camacho "der wohl grösste lebende Esperanto-Lyriker" (probable la plej granda vivanta Esperanto-lirikisto).

Quemadura eniris la liston de dek du libroj rekomenditaj de la Asocio de Eldonistoj de Poezio en 2020. Gratulon Jorge!

INTERVJUO AL MARÍA LUISA SORIANO GONZÁLEZ

María Luisa Soriano (konata kiel Marisol) estas nova esperantisto universitata profesoro en la Universitato de Sevilo, bona ekzemplo de homoj, kiuj profitis la devigan enhejmiĝon pro pandemio por lerni Esperanton kaj ekkoni nian komunumon. Nia redakcio ricevis tekston pri intervjuo fare de samideano el Sevilo Antonio Rodríguez kaj jen ĝi:

Marisol, ĉu vi ŝatas lingvojn?

Jes, krom la hispanan kaj Esperanto, mi konas kvar aliajn.

Kiam vi ekkonis Esperanton?

Dum mia infanaĝo, mia patro diradis, ke estus bone se ĉiu homoj parolu komunan lingvon. Li menciis Esperanton al mi kaj ekde tiam mi estis scivolema pri ĉi tiu lingvo. Nek lerneje, nek universitate, mi aŭdis pri la lingvo. Finfine, dum la virusa mondmalsana enhejmiĝo mi decidis lerni Esperanton.

Kial vi lernis Esperanton?

Ĉar mi ŝatas la ideon, ke ĉiuj povus paroli kun ĉiuj en sama lingvo. Lingvo, ke ne estu nacia lingvo, sed dua komuna internacia lingvo.

Kion vi eble plej ŝatas el Esperanto?

Gramatike, la libereco formi kaj transformi vortojn kaj frazojn kaj pro tio mi sentas min pli libera ol en mia denaska lingvo. Krome kaj persone, la eblecon povi paroli kun homoj en la tuta mondo; koni aliajn kulturojn kaj aliajn pensmanierojn.

Vi decidis ĉeesti rete internaciajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Ĉu vi havas ion rakontindan el ili?

Pro la pandemio ĉiuj kursoj, kongresoj kaj eventoj fariĝis virtualaj kaj mi povis partopreni en NASK, SES, VEKI de ILEI, VK (Virtuala Universala Kongreso) de UEA, KAEST kaj la Reta Novjaro. Ankaŭ en naciaj kongresoj kaj multe da lokaj renkontiĝoj. La fakto, ke ĉiuj eventoj estu virtualaj, permesas al multaj homoj partopreni multajn renkontiĝojn, negrave kie ili estas en la mondo kaj sen la enorma elspezo, kiun povas kunporti vojaĝi al alia lando por ĉiu evento. Tial, ĉi tiu virtualeco permesas al mi ĉiutage esti mergita en Esperanto kaj plibonigi kaj plivastigi miajn sciojn pri Esperanto.

Post via sperto en la Esperanta mondumo, ĉu vi konsideras ĝin utila aŭ simple koininda?

Ambaŭ. Esperanto estas tre utila, ĉar oni povas kontakti, kunlabori aŭ amikiĝi kun homoj el la tuta mondo per nur unu lingvo. Esperanto, en nur kelkaj monatoj, jam donis al mi multe pli ol mi povus imagi. Mi partoprenis en multaj internaciaj kongresoj kaj eventoj, en kiuj mi lernis ne nur Esperanton, sed mi ankaŭ lernis pri tre diversaj temoj per Esperanto. Mi ĉeestis fakajn prelegojn, inkluzive paroladojn pri mia akademia intereso. Mi havis seriozajn kaj profundajn konversaciojn kaj mi povis koni aliajn vidpunktojn kaj aliajn pensmanierojn de aliaj kulturoj. Mi ankaŭ estis invitita prelegi en Esperanto dum la evento Reta Novjaro kaj mi multe lernis danke al ĉi tiu okazo. Aliflanke, Esperanto ankaŭ donis al mi amikojn kaj mi havis tre bonajn, amuzajn kaj ridajn momentojn.



Post via sperto en la Esperanta mondumo, ĉu vi konsideras ĝin utila aŭ simple koininda?

Ambaŭ. Esperanto estas tre utila, ĉar oni povas kontakti, kunlabori aŭ amikiĝi kun homoj el la tuta mondo per nur unu lingvo. Esperanto, en nur kelkaj monatoj, jam donis al mi multe pli ol mi povus imagi. Mi partoprenis en multaj internaciaj kongresoj kaj eventoj, en kiuj mi lernis ne nur Esperanton, sed mi ankaŭ lernis pri tre diversaj temoj per Esperanto. Mi ĉeestis fakajn prelegojn, inkluzive paroladojn pri mia akademia intereso. Mi havis seriozajn kaj profundajn konversaciojn kaj mi povis koni aliajn vidpunktojn kaj aliajn pensmanierojn de aliaj kulturoj.

Mi ankaŭ estis invitita prelegi en Esperanto dum la evento Reta Novjaro kaj mi multe lernis danke al ĉi tiu okazo. Aliflanke, Esperanto ankaŭ donis al mi amikojn kaj mi havis tre bonajn, amuzajn kaj ridajn momentojn.

Ĉu vi intencas plu esperantumi?

Certe ja. En la estonteco mi volus esplori Esperanton kun la universitato, verki artikolojn kaj instrui Esperanton. Mi apartenas al universitata esplorgupo, kiu traktas homajn rajtojn. Mia tezo kaj miaj postaj artikoloj temas pri indiĝenaj rajtoj, kaj mi pensas, ke nun mi povus esplori homajn rajtojn kaj lingvajn rajtojn rilate al Esperanto. Mi jam havas planon verki artikolon pri ĉi tiu temo ĉi-jare. Aliflanke mi planas daŭre lerni Esperanton, por ke estonte mi povu instrui ĝin. Krome, mi konservos la amikecojn, kiujn donis al mi Esperanto, kaj mi daŭre renkontos novajn homojn, kiuj certe riĉigos mian vivon.

Dankon Marisol.

Intervjuis Antonio Rodríguez

MESAĜO DE UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO, 21 FEBRUARO 2021

Universala Esperanto-Asocio salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2021.



Universala Esperanto-Asocio

La celo liveri bonkvalitan edukadon al ĉiuj – la kvara el la deksep Celoj por Daŭripova Evoluigo – postulas etoson de fido kaj subteno de ĉiuj partioj: instruistoj, studentoj, politikistoj, kaj oficialaj klerigaj instancoj. Tia etoso siavice postulas, ke studentoj havu la plej bonajn situaciojn por lerni. Unuavice, tio signifas lernadon en lingvo kiun ili plene komprenas – nome la gepatra lingvo.

Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2021 la Internacia Jaro de Paco kaj Fido. Bona komencopunkto de tia iniciato estas lernejoj.

En multaj landoj kaj cirkonstancoj infanoj ne estas instruataj en la propraj lingvoj kaj oni malmulton faras por helpi ilin transiri al la lingvo de instruado. Tio ofte malavantaĝas ilin tutvive, nuligante la pozitivan de lerneja ĉesto, de kompetenta instruado, kaj de investo en lerneja infrastrukturo. Sen instruado de lernantoj en lingvo kiun ili komprenas, ni forĵetas monon kaj, kun ĝi, promesplenajn vivojn.

La ĉefa celo de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo estas emfazi la edukajn avantaĝojn de uzado de la gepatra lingvo en lernejoj, precipe elementaj lernejoj. Infanoj lernas legi kaj skribi pli rapide en lingvo kiun ili plene scipovas. Ili spertas malavantaĝon se ili devas komenci sian lernadon en lingvo kiun ili *ne* scipovas, parte aŭ komplete.

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo memorigas nin ankaŭ, ke en multaj mondopartoj al tutaj lingvoj mankas oficiala statuso, oni diskriminacias kontraŭ iliaj parolantoj, kaj oni malatentas iliajn kulturajn valorojn.

La lastatempa Monda Festivalo de Esperanto kunvenigis milojn da Esperanto-parolantoj en trimonata virtuala aranĝo. Ĝia fina rezolucio enhavis deklaron ke Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko devus krei “pli inkluzivan lingvopolitikon, se ili volas mobilizi la tutmondan socion ĉirkaŭ siaj celoj.” La subteno kiun Unesko dediĉas al edukado en la gepatraj lingvoj de infanoj estas bona ekzemplo de tia inkluziva politiko ĉar ĝi portas lernadon al la studentoj anstataŭ porti la studentojn al lernado. Tion farante, ĝi igas ilin pli bonaj kaj pli totalaj partoprenantoj en paca kaj justa socio.

En la nuna tempo, tempo de pandemio, estas aparte grave, ke la klerigo de infanoj inkluzivu ankaŭ la gepatrojn kiel partnerojn en la edukado – kaj tio en si mem eble necesigos edukadon en la gepatra lingvo, en lingvo kiun gepatroj kaj infanoj dividas inter si kiel parton de sia heredaĵo.

UEA kredas je edukado por ĉiuj en lingvoj kiujn ili komprenas, je lingva justeco en ĉiuj ties aspektoj, kaj en mondo pli paca pro edukado kaj interkompreno. Nia Asocio laboras tiucele en ĉiu angulo de la mondo, kunligite de la Internacia Lingvo Esperanto. Ni alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, kaj ĉiuj kiuj kunlaboras por atingi daŭripovan mondon, ke ili plenumu Celon 4 por Daŭripova Evoluigo kaj la scion, egalecon, justecon kaj perspektivon kiun tia atingi alportus.

Ni promesas nian subtenon en tiu klopodo, kaj atentigas pri la valoro de la Internacia Lingvo Esperanto por atingi homojn en multaj landoj per mesaĝoj kiel tiu ĉi de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo – valoro kiun Unesko jam spertas per sia admirinda eldonado de verkoj ankaŭ en Esperanto.

Rete

KRESKAS LA INFORMADIKA SKIPO DE HEF

Kiel treeble vi scias, HEF, iom post iome, proponas novajn servojn en la Reto. Ĝi tenas ne nur sian paĝaron, sed ankaŭ Bitotekon, la bibliotekajn katalogojn, datenbankojn, kiel Tradukoteko, kaj eĉ la tre uzatan vortaron de De Diego. Aperis multaj novaj taskoj kaj ili fariĝis pli malsimplaj kaj fakaj, kaj sekve de tio ŝprucis, do, la maltrankvilo, ĉu ĉio ĝis nun konstruita daŭros, se la tuto plu dependas nur de unu sola homo, kiu povas trapasi personan problemon, kiu malebligos lian laboron.

Kadre de tio, ni lanĉis kampanjon en la retejoj por allogi novajn kunlaborantojn. Du novaj volontuloj, Daniel Molina, el Granado kaj Angel Sánchez de la Cruz, el Kanario, akceptis partopreni nian teamon, en kiu jam kunlaboradis David Trigo, el La Granja kaj mi mem, el Madrido. Ni jam komencis krei dokumentaron kun ĉiuj teknikaj datenoj necesaj por teni nian agadon en la Reto. Ni esperas, ke per tiu nova “forto”, ĉio atingita ĝis nun daŭros estontece, kaj eĉ ni kredas, ke ni povos baldaŭ entrepreni novajn projektojn.

Dank’al niaj novaj kunlaborantoj ni jam povis plibonigi Tradukotekon, kaj celas renovigi la vortaron kaj la paĝaron. Kompreneble, ni estus eĉ pli entuziasmaj se pliaj teknikuloj dezirus partopreni, por kio, se vi interesiĝas, ne hezitu peti informojn pri tio je esperanto@esperanto.es

Miguel Ángel Sancho



IOM DA MATEMATIKO

La litero de la hispana nacia identigilo.

Ĉiuj hispanoj pli ol 14-jaraĝaj devige havas sian nacian identigilon, nomumita pere de siaj komencliteroj en la hispana: DNI (Documento Nacional de Identidad). La unua DNI estis eldonita en 1951 en Valencio. Franco (*pr. Franko*), la tiama diktatoro en Hispanio, rezervis por si la numeron 1, por sia edzino la numeron 2 kaj por sia filino la numeron 3.



La numero de tiu identigilo estas bezonata por la plej diversaj aferoj: malfermi konton en banko, havigi pasporton, rilatiĝi al fisko por pagi impostojn, ktp.

Ekde 1990, al tiu numero, ĉe ĝia fino, ĉiam akompanas litero kaj ambaŭ kune formas la tiel nomata “Fiska identiga numero” aŭ NIF (Número de Identificación Fiscal).

El matematika vidpunkto, ni povas demandi al „i ĉu la elekto de tiu litero estas hazarda. La respondo evidente estas “ne”. Kaj ni diras “evidente” ĉar multaj el ni foje spertis kiel sufiĉas skribi la numeron por ke komputilo aŭtomate liveru la literon. Tio signifas ke devas esti ia rilato inter numero kaj litero aŭ, alivorte, ia matematika metodo, kiu liveras la literon. Jen ĝi:

Ni elektu la 23 numerojn, kiuj iras de 0 ĝis 22 kaj asigu unu literon al ĉiu numero laŭ la jenaj ekvivalentoj:

- 0-T 1-R 2-W 3-A 4-G 5-M 6-Y 7-F 8-P 9-D 10-X
11-B 12-N 13-J 14-Z 15-S 16-Q 17-V 18-H 19-L 20-C 21-K 22-E

Kaj nun ni hazarde elektu iun numeron de DNI, ekzemple 14.921.436

Ni dividu ĝin per 23 kaj kalkulu la reston:

$$\begin{array}{r}
 14921436 : 23 \\
 \underline{112} \\
 201 \\
 \underline{174} \\
 133 \\
 \underline{186} \\
 2
 \end{array}$$

Resto = 2, kio signifas ke la litero asignita al tiu DNI estas “W”. Do, la plena numero estus 14921436W.

En la supra bildo: numero 00000023. Resto: 0. Litero: T. Plena numero: 00000023T.

Kiel ekzercu vi povas kontroli ĉu la método validas ankaŭ por via propra DNI (certe validas. Se ne estus tiel, vi havus problemon antaŭ hispanaj institucioj).

Se vi atenteme legis la suprajn alineojn, eble stariĝis en via kapo la demando kial oni elektis tiun strangan numeron, 23, kiel divizoro. Unue, ĉar la hispana alfabeto havas 28 literojn (29 kun “w”, kiu fakte ne apartenas al ĝi). El tiuj 29 oni forlasis tiujn, kiuj estas duliteraj (ch,ll), tiun kun supersigno (ñ) kaj tiujn du, kiuj povas konfuziĝi kun ciferoj (I-O). Post tio, restis 24 literoj. Oni rezignis ankaŭ pri la litero “U” por havi 23.

Kaj la numero 23 havas gravan proprecon: ĝi estas prima (memoru de via elementa lernejo: “primo estas numero dividebla nur per 1 kaj per ĝi mem, kiel 1, 2, 3, 5, 7, 11, ...”). Tiel, kiam ni dividas per 23, la resto povas varii de 0 ĝis 22 kaj (grave!) tiu resto estas unika por ĉiu numero kiun ni dividas.

Se la divizoro ne estus prima, ekzemple, se estus 10, povus okazi la jeno:

14921436 dividita per 10 donas reston 6

Sed $\frac{14921436}{10} = \frac{7460718}{5}$ kaj la resto de tiu ĉi lasta divido estas 3

Sekve, la numeron 14921436 povus havi du malsamajn restojn, kiam oni dividas ĝin per 10, kio malfaciligus doni unu solan literon al ĉiu DNI-numero.

Por fini, jen demando, kiun vi eble jam kapablas respondi: Kiun rolon ludas la litero de DNI?. Ĝi kontrolas ĉu homo korekte skribas sian DNI-numeron ĉar se iu cifero estus erara, la litero estus evidente alia.

Jesús M. García Iturrioz

www.esperanto.es



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO